Universala Esperanto-Asocio

REVUOJ ATENTINDAJ

Estrara Subteamo: MOVADO

EKO 2015-49 sendita el Budapeŝto la 16an de novembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, la E-gazetaro kaj radiostacioj, listoj kaj unuopuloj (petu senpagan ricevon!).

# Plia atingo por niaj instruistoj en ILEI

Aperis la unua plenkolore presita numero de la revuo *Internacia Pedagogia Revuo*. Ĝi raportas pri la ĵusa Konferenco de ILEI okazinta en Ostendo, Belgio, do la enhavo egalas al la altigita teknika kvalito. Gratulindas Jozefo Németh por dudekunujara redaktado de tiu revuo, kiu senkonteste okupas delonge pintan lokon inter niaj fakrevuoj.




El la enhavo de Internacia Pedagogia Revuo 2015 / 3

p 3 Enkonduko al la 48-a Konferenco de ILEI en Ostendo (M. GROSJEAN)
**p 4 d-ro Reginald MOREELS: Ĉu milito povas esti justa? Ĉefa simpozia prelego de belga pacaganto inter kirurgoj.**
p 12 M. GROSJEAN: Granda paco post grandaj militoj (konferenca temo)
p 19 Radojica PETROVIĈ: Resumo de la faka konferenca programo
p 26 M. GROSJEAN: Pri la premio Mauro La Torre.
p 27 S. MacGILL: AMO 'Ege(re)' progresas: seminario por sudorienta Eŭropo.
p 28 S. MacGILL: UEA kaj Kapabligo: rekomendoj kaj rimedoj finfine kunigitaj
p 29 M. GROSJEAN: Brila skipo parolis al atentema publiko (pri kolokvo TTK)
p 31 Germain PIRLOT: Paĝo por tiuj el ni, kiuj loĝas en Eŭropo (pri AEDE)
p 32 Aranka LASLO: E-fakrondo en la politeknika lernejo, Subotica (Serbio)
p 36 Leandro ABRAHÃO: Raporto pri la E-koniga „Projekto Stelo” (Brazilo)
p 38 GONG Xiaofeng: Konsulino de la belga konsulejo en Beijing eklernas Esperanton
p 39 Radojica PETROVIĈ: En la betulurbo pri aktualaj evoluvojoj de lernado (fruaj informoj pri la sekva konferenco en Nyiregyháza, Hungario)

Informoj pri aliĝo al ILEI kaj pri ĝiaj agadoj: www.ilei.info.

La du lastaj trimonataj raportoj pri la agado de ILEI troveblas tie:

Aprilo-Julio 2015: http://www.ilei.info/agado/2015-07-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

Julio-Oktobro 2015: http://www.ilei.info/agado/2015-10-15_Raporto_pri_trimonata_periodo.pdf

# Balkana kunlaborigilo – tradicia revuo

UEA pro sia historio havas du nefacile kongruigeblajn organizajn strukturojn: unuflanke aron da individuaj membroj, due membrojn el landaj asocioj. Tiuj du estas nefacile kongruigeblaj, kiel notas Johan Derks:

“La iniciato por vigligi la movadon apartenas al individuoj, sed la organiza strukturo malfaciligas al ili disvolvi iniciatojn kiuj rilatas al la interna (transnacia) ideo. Regiona gazeto povas helpi al tiu disvolvado, des pli ĉar en la lastaj dudek jaroj multaj landaj bultenoj ĉesis aŭ aperas [malofte]. Neniu organizaĵo povas travivi sen paperaj komunikiloj.

Ĉar la situacio estas precipe zorgiga en sudorienta Eŭropo, mi decidis ekaperigadi kvaronjaran paperan revuon "Balkana Verda Stelo", iom provoka nomo, ĉar ĝi volas influi malbalkanige. Tio ja estas esenco de la interna ideo, por kiu UEA estis starigita.




La nulnumero aperis en junio. La septembra numero, kun dudek paĝoj pri rifuĝantoj tra Balkanio, paperfiksas bildojn de internacia krizo kaj povos fariĝi ŝatata objekto por kolektantoj. Skribu al johan.derks@gmail.com por papera aŭ reta ekzemplero. Espereble tio helpos konsciigi esperantistojn pri la neceso etendi la nacian kontaktreton inter kluboj trans la landlimon, por kaj per Esperanto.

Mi financas la malprofitodonan entreprenon, ĝis eble – post du jaroj – ĝi estos pruvinta sian ekzistorajton. Sed eĉ la abonprezo de € 16,= jare estas alta por plimulto de regionanoj. Ekabonu, de kie ajn en la mondo, per pago al konto ĉe UEA kun kodo *bvst-n*. Mi ankoraŭ serĉas perantojn en apartaj landoj por raporti pri Esperanta kaj aliaj kulturoj kaj dissendi numerojn per nacia poŝto.

La plenan proponitan tekston vi povas peti de la aŭtoro.

## Nova kurso en Togolando

En Togolando ĉiuj lernejoj malfermis la pordojn, kadre de la nova lernojaro, la 28-an de septembro 2015. Tiam la mezgrada lernejo King's Tech de Notse (100 km norde de Lomeo) malfermis la siajn; ĝi unuafoje decidis akcepti Esperanto-kurson, kiun gvidas s-ro Amevor Koadjo unuhore semajne al 22 gelernantoj de la unua klaso.

S-ro Amevor Koadjo reklamas la kursoni per afiŝoj, informfolioj kaj radiaj programoj, kun subteno de la Afrika Komisiono de UEA. Koadjo lernis Esperanton en 1987. Li vojaĝis i.a al Gabono, kie li provis instrui en televida programo. Li estis vic-prezidanto de Unuiĝo Togolanda por Esperanto kaj aŭtoro de pluraj kantoj orginale verkitaj kaj tradukitaj en Esperanton. Niaj junaj lernantoj kaj ilia instruisto ĝojos ricevi gratulmesaĝojn, leg- kaj lerno-materialojn kaj ankaŭ korespondpetojn de similaj klasoj tra la mondo. Sendu rete al: maurice.amevor<ĉe>yahoo.fr aŭ al la lernejo King's Tech ĉe: dkingstech<ĉe>yahoo.fr

Laŭ teksto sendita de Adjévi Adjé

## Nitravivas!

Preparlaboroj por la sekva Universala Kongreso: KONGRESA Filmĵurnalo de Verda Stacio numero 11. Rekte el la kongresurbo Nitra:

https://www.youtube.com/watch?v=jdLF5UQt5lg

Vortoj: 695

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Por vidi pli malnovajn komunikojn iru al: www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...